

Esperanto 257 aktuell

38. Jahr (2019) №5 (257)



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



- Multkultura vilaĝo Esperanto dum Pol'and'Rock-Festivalo
- Sukcesa Esperanto-projektsemaĵo ĉe loka lernejo OBS en Herzberg
- Greta ne plu estas! ● Kontraŭmilitaj libroj de la eldonejo KAVA-PECH
- Protokoll der Bundesversammlung am 09.06.2019 in Neumünster
- BET-55 en Litovio ● La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak ● Esperanto en la muzikfestivalo Pol'and'Rock ● Esperanto-Sommerfreizeit SALO 14 in Herzberg

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotoj kaj donacoj)
/ Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEFIERB,
Sparkasse Odenwaldkreis,
DE 3250 8519 5200 4011 4571.
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle:

Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Sibylle Bauer**

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

Memproprizorgado / Mitgliederbetreuung

DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111

gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl: -5125

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Durchwahl: -5114

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg

Publika agado kaj pliklerigado /

Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung

Oliver Walz, Durchwahl: -5116

Kongresoj kaj renkontiĝoj / Kongresse und Treffen

Andreas Diemel, Durchwahl: -5120

IT-aferoj (teknikaj) /

Informationstechnologien

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Jugendvertreterin / GEJ-komisiito

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5211

gej.prezidanto@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Verantwortliche für Presse- und Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19,

70186 Stuttgart, 0163-3873785,

rainer.kurz@esperanto.de

Komisiito por rondvojaĝoj / Verantwortlicher für Rundreisen

Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenberg, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,

Durchwahl: -5122, buchversand@esperanto.de,

www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj

kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg,

die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521)

1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,

www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

biblioteko@esperanto-aalen.de

bibliothek-aalen@esperanto.de

www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,

aef@esperanto.at, <http://aef.esperanto.at>

Esperantomuzeo Viena /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift:

Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz

1, Postfach 25, 1015 Wien, [plansprachen@](mailto:plansprachen@onb.ac.at)

onb.ac.at, [www](http://www.onb.ac.at).

onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel.

+43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23,

42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Hermann Kroppenberg (Medienecho),

Utho Maier (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)

Presejo / Druck

Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun *-kune-* havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 18 €

(de eksterlando: 24 €) jare.

Esperanto aktuel mit *-kune-* erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 18 €

(Ausland: 24 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2019/6 ĝis

la 15-a de novembro 2019. Paperaj kontribuoj

nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh

(vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im

Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,

für Nr. 2019/3 bis zum 15. November 2019.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan (s.o.).



Karaj legantoj,

komence de septembro la estraro de Germana Esperanto-Asocio kunvenis en nia oficejo en Berlin. Ni priparolis la organizan kaj financon situaciojn, la pasintajn kaj planatajn kongresojn kaj renkontiĝojn, informadon, instruadon en lernejoj kaj aliajn aktualaĵojn. La problemoj estas konataj al vi kaj similas al tiuj de aliaj asocioj: nia mezuma aĝo estas alta, sekve denove iom malkreskis la membraro. Pro tio ankaŭ la enspezoj el kotizoj verŝajne restos sub la origina prognozo, same ĝis nun la donacoj. Aliflanke la ĉi-jaraj renkontiĝoj (Luminesk', PSI kaj la kongreso en Neumünster) alportis profiton. Krome GEA en la nuna jaro sukcesis – kun afabla helpo de la specialistoj ĉe KOSMO, kiuj havas multajn spertojn pri subvencipetoj – sekurigi konsiderindan sumon el la EU-programo Erasmus+. La subvencioj estas destinitaj por helpi al niaj aktivuloj partopreni en pliklerigaj aranĝoj en EU-eksterlando. La nuna projekto daŭras ankoraŭ ĝis aŭtuno 2020. Subvencipetado ĉiam kaŭzas aldonan laboron, kaj reguloj devas esti respektataj. Sed la klopodoj valoras. GEA povas tiamaniere plivastigi sian oferton kaj ankaŭ mem gajni aldonajn enspezojn. Vi trovos informojn pri la procedo aliloke en la venonta eldono de “Esperanto aktuell”.

Detale ni priparolis la venontan Germanan Esperanto-Kongreson, kiu okazos dum pentekosto 2020 en Frankfurt (Oder) kaj Slubice. Kunorganizos ĝin Pola Esperanto-Asocio kaj la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. En la kadro de la kongreso ankaŭ okazos la jara asembleo de Eŭropa Esperanto-Unio. Unuan informilon kaj aliĝilon vi trovis

en la pasinta eldono de ĉi tiu revuo; aliĝi ankaŭ eblas rete. La kongreso havos la temon “najbaroj”. Pri ĝi jam ekzistas multaj ideoj, kiujn ni esperas realigi kaj financi. Por GEK 2021 ankoraŭ estas esplorataj diversaj eblecoj. Por la 100-a Germana Esperanto-Kongreso en 2022 ni planas reveni al Braunschweig: la loko de la unua en 1906. Kaj por la jaroj ekde 2023 ni esploras denove aranĝi komunan kongreson kun nia partnera asocio en Francio. Por Frankfurt (Oder) jam alvenas la unuaj aliĝoj: aliĝu baldaŭ, se vi volas profiti de favora kategorio. Cetere eblos favorepreze loĝi en komfortaj studentaj ĉambroj sur la pola flanko: tranokto tie kostos proksimume 20 eŭrojn po nokto en unulita kaj 16 eŭrojn po nokto kaj persono en dulita ĉambro. La kontaktadreson de la studenta hejmo en Slubice vi trovas en la unua informilo. Skribante al ili (ili komprenas la polan, germanan kaj anglan) indiku, ke vi partoprenos la Esperanto-kongreson.

Kiel multaj el vi mi uzis la someron ne nur por ferii, sed ankaŭ por partopreni en Esperanto-renkontiĝoj. Mi ĉeestis la imponan Universalan Kongreson en la glaci-sportejo de Lahti (kiun bedaŭrinde mil kongresanoj ne sukcesis komplete plenumi) kaj almenaŭ dum du tagoj la kongreson de Itala Esperanto-Federacio en Trieste: ankaŭ ĝi tutsemajna evento kun pluraj ekskursoj en bela regiono. Partoprenis pli ol 200 esperantistoj, multaj el ili el Germanio. Informojn pri la venontjara Itala Kongreso en Assisi vi trovos en la sekva kajero. La aro de someraj renkontiĝoj kaj la granda nombro de partoprenantoj (en Baltiaj Esperanto-Tagoj laŭdire pli ol 450) pravas la viclecon de nia movado. Unuflanke do malkreskantaj membronombroj, aliflanke vigla Esperanto-sceno ĉie en la mondo. Kiel resti daŭripova sub tiuj kondiĉoj, kiel plej efike varbi kaj instrui – jen la temoj de la venonta kunveno de la liga konsilantaro de GEA, kiu kunigas la estraron kaj komisiitojn kun la landaj ligoj, fakaj asocioj kaj individuaj aktivuloj. Ĝi okazos denove en Herzberg, ĉi-foje la 2-an de novembro, kaj mi esperas multajn el vi tie revidi!

Amikajn salutojn,

Ulrich Brandenburg

Enhavtabelo/Inhalt

1: Multkultura vilaĝo Esperanto dum Pol'and'Rock-Festivalo en Pollando (p. 20-21). Foto: Stano Marček

2: Adresoj

3: Germana Esperanto-Asocio:

Karaj legantoj! Enhavtabelo.

4-5: Interkultura Centro Herzberg:

Sukcesa Esperanto-projektsemajno ĉe loka lernejo OBS en Herzberg. Kulero GmbH (Neue Firma in Göttingen). Mondvaste unika praktika Esperanto-Servokatalogo

6-8: Aŭstria Esperanto-Federacio:

Greta ne plu estas! Kontraŭmilitaj libroj de KAVA-PECH. Trevor Steele: *Der Flug des Kakadus*.

9-10: Medienecho.

11: Kalendaro.

12-15: Germana Esperanto-Asocio:

Protokoll der Bundesversammlung am 09.06.2019 in Neumünster. Pedagogia studsesio: Ekzercoj – kreado kaj solvado. Informationen des Schatzmeisters. Erasmus+: subvencioj por vojaĝi eksterlanden kaj kleriĝi

16: El bibliotekoj kaj arkivoj:

Folge 49 – Ist jemand bereit itzuhelfen?

17-21: El la mondo: BET-55 en

Litovio. La 52-a ILEI-kongreso en Čačak, Serbio. Esperanto en la muzikfestivalo Pol'and'Rock

22-26: El la landaj ligoj:

Sprachbarriere überwinden? Ja, aber wie? Kariero kiel liber-laboristo: Jobs-fuer-Fluechtlinge.de enkondukas multajn projektojn. Viva Esperanto-kulturo en Zamenhof-parko Berlino Lichtenberg

27-30: **kune** – revueto de Germana

Esperanto-Junularo: Esperanto-Sommerfreizeit SALO 14 in Herzberg 3.-10. August 2019. Hallo liebes Mitglied. Expolingua in Berlin 22.-23.11.2019. Mein Sommer auf Kreta. Korusoj serĉataj, kiuj kantas Esperante, en Unesko-konzerto

31-32: Germana Esperanto-Asocio:

Aliĝilo al LUMINESK', la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

Sukcesa Esperanto-projektsemajno ĉe loka lernejo OBS en Herzberg

Dum pli ol 18 jaroj ni instruis Esperanton fakultative en la lokaj lernejoj.

Tio ne estas simpla afero, ekzemple posttagmeze la gelernantoj estas lacaj kaj volas iri aŭ veturi hejmen. Ofte ne aperis noto sur la lerneja atestilo. Kutime la gelernantoj partoprenas nur la laŭleĝe devigajn fakojn, aŭ dum la fakultativa instruado serĉas muzikon, sportumadon kaj simile.

Ĉi-jare ni kontaktis geinstruistojn en la loka Oberschule (OBS). Unu instruisto estis tre malfermita por Esperanto kaj eĉ proponis Esperanto-projektsemajnon. Aktive li varbis proksimume dek gelernantojn el diversaj klasoj. Zsófia Kóródy kun Michaela Stegmaier instruis dum kvar antaŭtagmezoj Esperanton laŭ diversaj metodoj kaj temoj.

Kune kun la klasinstruisto oni organizis gvidadon tra la urbo kun klarigoj per bazaj vortoj en Esperanto. La gelernantoj ĝojis pri la multaj dulingvaj voĉmontriloj kaj klarigtabuloj en Esperanto.

Kompreneble ili ĉiuj, eĉ kun kelkaj patrinoj, vizitis la Esperanto-Centron. Ili vidis nian riĉan bibliotekon kaj kun intereso rigardis la Esperanto-versiojn de konataj germanaj kaj mondliteraturaj verkoj. Ili ankaŭ miris pri junulara literaturo, bildstriaĵoj rakontoj kaj sonmaterialoj.

Kelkaj el la partoprenintoj de tiu lerneja kurso en la projektsemajno poste aliĝis al la bilaterala ĝemelurba feriosemajno, okazinta en la komenco de aŭgusto en Herzberg. Ili daŭrigis la lernadon kaj praktikis la lingvon en ĉiutagaj situacioj, kunloĝante kun la polaj gejunuloj. Ekestis novaj amikecoj kaj eĉ Esperanto-junulkubo elkreskis el la bonsukcesaj klopodoj. Ni planas daŭrigi en iu fakultativa formo instruadon de Esperanto en OBS.



Kulero GmbH (Neue Firma in Göttingen)



Kaum hatten wir durch das Internet erfahren, dass in unserer Kreisstadt Göttingen eine neue Firma einen

esperantosprachigen Namen "Kulero" trug, schon war der nette Kontakt hergestellt. Juliane Schöning, die junge Geschäftsführerin, suchte zusammen mit ihren Vorstandskollegen einen tauglichen Firmennamen für essbare Bestecke.



Das Wort für Löffel in Esperanto „kulero“ gefiel ihnen gleich sehr gut. Die junge Unternehmerin, die auch Sprachstudentin (sie lernt auch asiatische Sprachen) ist, möchte natürlich selbst auch Esperanto lernen.

Als bald tauchte sie mit zwei aktiven Kollegen im Herzberger Esperanto-Centro auf. Es kam ein nettes Interview zustande. Auch wunderten sie sich über die vielen Bücher in der Herzberger Esperanto-Bibliothek.

Das junge Unternehmen "Kulero GmbH" möchte aktiv gegen den Plastikmüll in der Gesellschaft vorgehen. Sie sind mit Begeisterung bei der Sache.

Die essbaren Löffel aus Getreide werden zunächst in Indien hergestellt. Diese gibt es in verschiedenen Geschmacksvarianten mit natürlichen Stoffen, wie Anis, Minze, Schokolade, rote Beete, schwarzem Pfeffer, Spinat. Diese zukunftsfähigen Produkte sollen zunächst in Eisdielen, bei Imbissständen, Fluglinien, Festivals, Catering, usw. angeboten werden.

Wir haben die essbaren Löffel gleich probiert. Die verzehrbaren Bestecke mit tollen Aromen für eine neue Zeit werden sicher viele neue Kunden finden. Wir bleiben in Kontakt. Viel Glück! Multe da feliĉo!

Mondvaste unika praktika Esperanto-Servokatalogo

DE-37412 Herzberg am Harz... la Esperanto-Urbo (Germanio). Stato: Aŭgusto 2019

Interkultura Centro Herzberg (ICH) – Interkulturelles Zentrum Herzberg

Germana Esperanto-Centro (GEC) – Deutsches Esperanto-Zentrum

(En la mezo de Germanio – bone atingebla per trajnoj, aŭtoj, Flix-busoj)

Daŭripova – modeldona – multflanka – publika – unika – tutjara

1. Germana Esperanto-Asocio – Filio por Klerigado & Kulturo

Estrado: Peter Zilvar & Zsófia Kóródy

Kelkaj ekzemploj rilate al servoj kaj taskoj:

1. Regulaj klerigmoduloj ĝis "Esperanto-InstruistIno/GEA", resp. "Esperanto-OrganizantIno/GEA", komence de oktobro la kulmina fakseminario TORPEDO.
2. Speciala biblioteko por klerigado kaj pluklerigado.
3. Organizado de fakseminarioj, diskutrondoj, laborkunsidoj, konferencoj kaj kongresoj.
4. Prizorgado de "Esperanto- kaj plurlingva-libroangulo" en la publika urba biblioteko en Herzberg am Harz.
5. Konstanta prizorgado de la publika „Esperanto-platformo“ en la kastela muzeo kun multaj diverstemaj Esp.-Fakekspozicioj, Informado, usw. (ĝis nun jam 14 div. ekspozicitejoj).
6. Regula Informlaborado, ekz. per gazetaro, retcirkuleroj, Harca Esperanto-Kuriero, radiostacioj kaj nia hejmapaĝo (blog): esperanto-urbo.de.
7. Organizado de modelaj interkulturaj agadoj, diversaj eŭropaj projektoj, ktp.
8. Novtipaj "Esperanto-modeloj" (publikaj kaj daŭripovaj).
9. Evoluigo de konstanta kaj multflanka "Pluklerigad- kaj Kulturplatformo" per la reto (kune kun kompetenta kaj sperta teamo, en preparo).
10. Organizado de laborfakgrupoj, interkulturaj kaj internaciaj projektoj, ktp.
11. Gazetarkivo en Esperanto-kromarkivejo:
 - Unika Libroarkivejo por blinduloj (libroj en brajl-skribo).
 - Esperantlingva Vikipedio kun informo pri Herzberg am Harz kaj la ĉirkaŭaĵo.
 - Konsultejo por multaj esperantrilataj temoj.

1. Esperanto-Societo Sudharco – Esperanto-Gesellschaft Südharz en DE-37412 Herzberg am Harz... la Esperanto- urbo, Germanio.

Respondeca komunutila asocio, aktivas de novembro 1976; antaŭe kiel klubo. Kunfondinto: Joachim Gießner, nask. dec. 1913, mortis nov. 2003.

- A) Konstanta oficejo kaj organizlaborado, preskaŭ tutjare atingebla.
- B) Fakbiblioteko (intertempe unu el la plej grandaj en la mondo dank' al pli ol 100 libro- & gazetdonacantoj) en vivanta medio kun fakkompetenta konsilado.
- C) Unika Fakarkivo (filmoj, diverstipaj sonunuoj, bildkartoj, E-filatel, diapozitivoj, fotoj, insignoj, glumarkoj, turismobroŝuroj, originaloj, medaloj, moneroj, specialkolektaĵo kun E-inkunabloj, ekspozicimaterialoj, ekz. mond vasta E-ŝtonkolektaĵo dank' al Esperanto.
- D) Regula Klubo marde, komenco 16:30 h (Laborrondo Esperanto/LEB), ekskursoj, vizitoj, gastigadservo (ĝis nun gastoj el pli ol 70 landoj), ktp.
- E) Oficiala Kunlaborpartnero de Esperanto-urbo Herzberg (de 11.07.2006), jen ekzemploj:
 1. Konstanta kunlaborado, ideoj, elkonstruado, ktp.
 2. De la jaro 2004 ĝemelurba laborado per nia pontlingvo Esperanto kune kun nia ĝemelurbo Góra/PL, ekz. per komunaj junularsemajnoj SALOj (ĝis nun jam 14).
 3. Specialaj ekspozicioj, renkontiĝoj, informintersanĝoj, ktp.
 4. Varbtekstoj pri Herzberg am Harz, ĝis nun en 19 lingvoj.
 5. Esperantlingvaj tekstfolioj sur la urba hejmapaĝo: Sub "Herzberg aktiv" kaj poste sub kapvorto "Esperanto".
 6. Esperanto en la gazetaro: <http://herzberg.de/magazin/magazin.php?menuid=377&topmenu=7&keepmenu=inactive>.
 7. & Esperanto-gazetarkivo sur la hejmapaĝo de la urbo: <http://herzberg.de/magazin/iarchiv.php?menuid=378&topmenu=7&keepmenu=inactive>. (Daŭrigota en la venonta numero).

Greta ne plu estas!

Post longa suferado ŝi fine mortis, en Linz,
76-jara, la 14-an de julio 2019.

Iam bone konata kaj ŝatata fervojistino, kiu pro sia malfermiteco baldaŭ trovis logan vojon al Esperantujo! Ofte kruciĝis tie niaj vojoj, kaj mi ĝoje konstatis, ke ankaŭ tie ŝi estis konforme respektata. Kiel samlanda kolego kaj funkciulo mi do aparte fieris pri ŝia amikeco!

Priskribi ŝiajn hejmlandajn meritojn nun jam superfluas.

Ĉe malfermita tombo mi preĝante omaĝis al ŝi.

Ŝia nobla lojaleco ekz. al Venecia Karnavalo kaj Esperanto-kantado de nia ĉeĥa amiko Miroslav Smyčka, ne nur min impresis.

La AEF-prezidanto, Alfred Heiligenbrunner, esprimiĝis simile en sia publika alparolo!

La partopreninta grupo de esperantistoj estis afable invitita de la organizantoj de la funebro al komuna tagmanĝo, kie la plej multaj kontribuis per siaj spertoj!



Kaj ni urĝe profitis tiun okazon, por preparoli la aktualajn – vere ne kontentigajn – cirkonstancojn.

Ne plu estas, kiel estis!

Dankon Greta, ke vi estis!

Martin Stuppig, Arnoldstein



Kontraŭmilitaj libroj de KAVA-PECH

Mia eldonejo KAVA-PECH longdaŭre strebas eldonadi librojn kun kontraŭmilita literaturo.

De tiuj malpli novaj mi volas rememorigi la kontraŭmilitan sprite ironian romanon de Jaroslav Hašek *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejko dum la mondmilito*, la averton kontraŭ la milito, verkita de Karel Čapek en sia sciencfikcia verko *R.U.R.*, la rigardon al la trista sorto de judoj dum la nazia regado *Taglibro de mia frato*, en kiu Chava Pressburger (kiel fraŭlino Eva Ginzová) montras historion de la holokaŭsto en Prago per okuloj de sia frato Petr Ginz, ĉiuflanke dotita juda knabo, kies juna vivo finiĝis kruele en

gaskamero, kaj la heroan agadon de la savinto de multaj judaj kaj germanaj senparencaj infanoj (ne ĉiam orfoj, al kelkaj oni iujn parencojn poste retrovis) senpere post la dua mondmilito, priskribitan en la verko de Karel Kraft *Heroo de amo* kun la subtitolo *La vivo de Přemysl Pitter*.



El la kontraŭmilitaj verkoj, eldonitaj antaŭ nelonge, mi nomu almenaŭ *Heredantoj de silentado* de Sabine Dittrich, la romano, en kies fono estas montritaj komplikaj rilatoj inter multaj ĉeĥoj kaj germanoj post la dua mondmilito, *Home en senhomeco* de aŭstra esperantisto kaj humanisto Martin Stuppig, rememoranta pri unu el la plej kruelaj bataloj de la dua mondmilito ĉe Montecassino, kaj la vivon en la britaj militkaptitejoj en Egipto, aŭ el la plej freŝa historio *La ŝtono de la amo*, en kiu la aŭtoro Sali Bashota, sendube la nun plej elstara kosova poeto, en la formo de poezio kaj poezia prozo respeguligas suferon de la kosovanoj dum kaj tuj post la milito en Kosovo.



Ankaŭ ĉi-jare la eldonejo daŭrigas tiun tradicion, ĉi-foje omaĝante la unuan virinan Nobel-premiiton pri paco Bertha von Suttner. Jam printempe aperis ŝia plej fama kontraŭmilita romano *For la batalilojn!*. Ĝin origine, en la jaro 1889, longe neniu eldonejo pretis aperigi (malgraŭ la jama alta renomo de la aŭtorino kiel fama verkisto) timante la reagon de la ĝenerale militema medio en la mititistaj Prusio kaj Aŭstrio. Sed poste ĝi fariĝis la plej sukcesa kaj onidire la plej tradukata libro de la 19-a jarcento.

La sloganojn pri honoro kaj gloro kaj pri la volonta heroo morto nomas Bertha von Suttner en sia verko “blasfemado”. Mi citu almenaŭ mallongan fragmenton: Kiam iu post perdita batalo restas kuŝanta sur la kampo kun frakasitaj membroj kaj tie netrovita, post kvar aŭ kvin tagoj kaj noktoj de sufero pro malsato, soifo kaj nedireblaj doloroj, vivante putranta, pereas — samtempe konsciante, ke lia morto neniel utilos al la patrujo, sed nur malesperigos liajn amatojn — tiam mi dubas, ĉu li volonte mortas kun la krio “Por la patrujo!”.

Jen la citaĵoj de almenaŭ du elstaruloj, post kiam ili tralegis la verkon. Iliaj leteroj troviĝas en la konservita korespondaĵo de la aŭtorino. Albert Nobel: “Jus mi finlegis vian majstroverkon. Oni diras, ke ekzistas du mil lingvoj; sed ne ekzistas eĉ unu, en kiun tiu via perfekta verko ne devus esti tradukita, por ke oni ĝin legu kaj pensu pri ĝi...”; kaj Lev Nikolajevič Tolstoj: “Mi tre estimas vian verkon kaj mi supozas, ke la eldono de tiu via verko estas bona signo”. Nuligon de sklaveco antaŭis la fama libro de alia virino



Harriet Beecher-Stowe “Dometo de onklo Tom”. Donu al ni Dio, ke post la eldono de via libro estu forigitaj militoj.




Temas pri la dua eldono de la traduko en Esperanton fare de Armand Caumont el la jaro 1914, lingve reviziita per kolektivo de esperantistoj, gvidata de Franko Luin en 2001, envicigita en la renomman serion de UEA Oriento-Okcidento. Mi intencis fine de la libro aldoni ĉapitreton pri la tre interesa vivo de la aŭtorino, sed fine mi ne faris tion, ĉar la dikan libron mi eldonis en ekstreme malgranda eldonkvanto 150 ekzempleroj, do ĝi estas relative multekosta; kaj mi supozas, ke la interesege vivo kaj agado de Bertha von Suttner valoras veni en la manojn de pli da legantoj, kio pli probable, se temas pri malpli ampleksa kaj pli favorpreza libro.

Mi do verkis apartan libron pri la aŭtorino *Sen laco por paco* kun la subtitolo *Vivo kaj verko de Bertha von Suttner*. Ĝi sufiĉe detale priskribas ne nur ŝiajn vivon kaj verkon, kion promesas la subtitolo, sed ankaŭ la tensioplanan politikan situacion kaj pacmovadon en Eŭropo antaŭ la eksplodo de la Granda Milito.

Mi forte esperas, ke tiuj kontraŭmilitaj libroj trovos siajn legantojn, la pacon subtenantajn esperantistojn, kiujn la verkoj pensigos ne nur pri la historiaj eventoj, sed ankaŭ pri multaj paraleloj kun nuntempo, en kiu ni vivas.

Pli da informoj pri la menciitaj libroj kaj ankaŭ pri la ceteraj eldonaĵoj de KAVA-PECH por esperantistoj vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz/esperanto>.

Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz



Trevor Steele: *Der Flug des Kakadus*

Phoibos Verlag, Wien 2019; broschiert, 346
Seiten. Aus dem Esperanto übersetzt von
Christian Cimpa. (Original: *Flugi kun kakatuoj*,
FEL 2010).

Trevor Steele ist ein bestens bekannter Autor. Das gilt für seine Muttersprache Englisch, noch mehr aber für seine geliebte Zweitsprache Esperanto. Als Leser des Romans befinden wir uns im 19. Jahrhundert, in der britischen Kolonie *Western Australia*.

Der Hauptkonflikt entspinnt sich zwischen habgierigen britischen Geschäftsleuten und Farmern auf der einen Seite, die nach und nach fruchtbares Land an sich reißen und den sich dagegen auflehrenden Eingeborenen-Stämmen. Die Hauptfiguren auf beiden Seiten sind Billy Dixon, ein junger englischer Einwanderer, der in Australien sein Glück sucht, und Yungaburra, ein ungewöhnlich begabter Eingeborener, der sich zunächst mit Billy anfreundet und durch ihn grundlegendes Wissen über europäische Kultur und Kriegsführung erwirbt. Yungaburra lebt nach einem Streit mit seinem mächtigen Onkel Elmaru über sein ausschweifendes Sexualleben lange Zeit von seinem Stamm getrennt. Als sich der Konflikt zwischen den Aborigines und den weißen Siedlern, in deren Diensten Billy und Yungaburra als Polizisten stehen, verschärft, muss sich letzterer für eine Seite entscheiden. Er tötet Billy und kehrt zu seinem Stamm zurück, um die englischen Eindringlinge zu bekämpfen. Das Ende der Erzählung spiegelt die wahre Geschichte Australiens: Dem Sieg der Briten folgt die Zurückdrängung der Aborigines in lebensfeindliche "Reservate", wo sie bis in unsere Tage dem physischen und psychischen Verfall ausgesetzt sind – allen Bemühungen der australischen Regierung zum Trotz, sich durch ein neues politisches Gebaren von den Verbrechen des Zeitalters der »Pioniere« abzugrenzen.

Zu einem wahren literarischen Werk wird der Roman nicht durch die beeindruckende australische Landschaft oder die zahlreichen historischen Details, sondern durch die Art, wie der Autor sie uns näherbringt. Kennzeichen guter Literatur ist es, dass sie dem Leser kein moralisches Urteil aufdrängt, wie es häufig in Dreigroschen-Romanen

geschieht. Ein guter Autor sollte die geschilderte Handlung glaubhaft vermitteln ohne zu bewerten. Und darin ist Trevor Steele ein wahrer Meister, auch wenn der Leser leicht erkennt, auf welcher Seite das Herz des Autors schlägt.


Hier bespreche ich nicht das Esperanto-Original, sondern seine deutsche Fassung, weshalb einige Worte zum Übersetzer angebracht sind. Ich finde, unserer Kultur mangelt es am Verständnis für den Wert »kongenialer« Übersetzungen belletristischer Texte. Weil der Übersetzer denselben Satz auf unterschiedlichste Arten wiedergeben

kann und seinen eigenen Ausdruck finden muss, ohne den ursprünglichen Inhalt zu verfremden, ist auch seine Arbeit – sofern gelungen – als künstlerisch zu bewerten. Diese Arbeit hat im Falle des Romans *Der Flug des Kakadus* (Original: *Flugi kun kakatuoj*) Christian Cimpa geleistet, ein Mitarbeiter der Sammlung für Plansprachen und des Esperantomuseums der Österreichischen Nationalbibliothek. Wichtig scheint mir hier, dass Christian Cimpa kein Unbekannter auf diesem Gebiet ist. Im Jahr 2017 erschien im renommierten Wiener Verlag Edition Atelier der faszinierende Roman *Turmstraße 4* des Esperanto-Schriftstellers Hans Weinhengst (Original: *Turstrato 4*). Ohne dessen

politische Anschauungen unbedingt zu teilen, musste ich den literarischen Wert seines Werks uneingeschränkt anerkennen – und ebenso das Geschick des Übersetzers einen adäquaten deutschen Ausdruck dafür zu finden. Ich ahnte bereits, dass mir sein Name in weiteren Übersetzungen

vergleichbarer Qualität wieder begegnen würde. Und tatsächlich präsentiert uns Christian Cimpa, der das österreichische Lesepublikum mit der deutschsprachigen Version von Weinhengsts Erstlingswerk überrascht hat, nun den Roman *Der Flug des Kakadus* von Trevor Steele. Ziel dieser Bemühungen ist es wohl nicht, für die Sprache Zamenhofs zu werben, sondern hochwertige literarische Werke daraus breiten Kreisen zugänglich zu machen. Denn niemand, der die eine oder die andere Übersetzung gelesen hat, kann jemals wieder dem lachhaften Vorurteil erliegen, Esperanto sei eine leblose Konstruktion, unfähig zur Wiedergabe sensibler Gedanken oder pulsierender Emotionen. Bleibt zu hoffen, dass noch viele weitere Übersetzungen in dieser hervorragenden Qualität folgen ...

Vinko Ošlak, Klagenfurt



Bestellungen unter
https://www.esperanto-buecher.de/epages/82996652.sf/de_DE/?ObjectPath=/Shops/82996652/Products/L3052
bzw. <https://kuerzer.de/KakaduDE>

Medienecho

Herzlichen Dank für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" – Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

Ohne Datum

Die Posthörnchen-Seite

Esperanto - Eine Sprache erwacht

Ein Stück Nachkriegsgeschichte auf philatelistischen Dokumenten

<https://www.posthoerhnaufdrucke.de/esperanto-eine-sprache-erwacht.html>

29. September 2019

Pfälzischer Merkur, Zweibrücken

Durch Lieder andere Kulturen erleben

https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/chor-fuer-zusammenarbeit-mit-osteuropa-zmo_aid-46175465

... der Chor [sang] Lieder in zehn Sprachen. Besondere Aufmerksamkeit erregten die außergewöhnlichen

Gesänge auf Esperanto. Der Vorsitzende des Zweibrücker Esperanto-Vereins, Oliver Walz, erklärte das Besondere dieser einfach Plansprache. „Esperanto ist 35 Mal einfacher zu lernen als Englisch.

Außerdem respektiert es als erste Fremdsprache jede Muttersprache.“

9. September 2019

Radio Dreyeckland

Esperanto-Magazin

<https://player.fm/series/radio-dreyeckland-180765/esperanto-magazin-montag-09092019>

8. September 2019

Pfälzischer Merkur

Zweibrücker Otto Walz feiert seinen 70. Geburtstag

Grenzenlose Möglichkeiten mit Esperanto

Bereits als Schüler kam der langjährige Präsident des Saarländischen Esperantobundes, Vorstandsmitglied im Deutschen Esperanto-Bund und Delegierter im Esperanto-Weltbund sowie Gründer des Esperanto-Clubs Zweibrücken mit der Eine-Welt-Sprache in Berührung. Seine Begeisterung ist im Laufe seines erlebnisreichen Lebens beständig gewachsen und auch mit 70 Jahren ist "Sinjoro Esperanto" vielfältig und hoch engagiert.

https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/esperanto-klub-zweibruecken_aid-45686095

1. September 2019

swissinfo

When Switzerland broadcast Esperanto around Europe

Eine Seite auf Englisch mit einem Beitrag von Claude Piron

https://www.swissinfo.ch/eng/language-from-the-archives_when-switzerland-broadcast-esperanto-around-europe/45177656#comments

1. September 2019

Süddeutsche Zeitung

Vom Bauerndorf zur Gartenstadt

Unter dem Namen "Parkurbo" plante Architekt Fritz Sievers im Jahr 1912 am Ostufer der Würm eine Hauptstadt für die

The screenshot shows a news article from the 'Pfälzischer Merkur' dated 08. September 2019. The headline is 'Zweibrücker Oliver Walz feiert 70. Grenzenlose Möglichkeiten mit Esperanto'. The article mentions that Oliver Walz, president of the Saarländischer Esperantobundes, has been involved with Esperanto since his school days. It also includes a small photo of him holding a bottle of 'Sinjoro Esperanto' and a weather forecast for Zweibrücken.

The screenshot shows an article titled 'Der Bruch in der Kommunikation' by Björn Marx, published on 27.08.2019. The article discusses the Meakusma festival, which is an experimental and club music festival. It mentions that the festival has been established since 2016 and is held in the Meakusma VoG. The article also notes that the festival is held in the Meakusma VoG and is held in the Meakusma VoG.

weltweite Esperanto-Gemeinde - mit 500 Einfamilienhäusern, Kirche, Theater, Kasino, viel Grün und einigem mehr.
<https://www.sueddeutsche.de/muenchen/landkreismuenchen/tag-des-offenen-denkmals-vom-bauerndorf-zur-gartenstadt-1.4583532>

1. September 2019

Radio F.R.E.I.

Einstündige Radiosendung aus Thüringen

https://www.radio-frei.de/?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1567360800

27. August 2019

Grenzecho

Der Bruch in der Kommunikation

Teil der Gemeinde Kelmis ist das Territorium des zwischen 1816 und 1919 unabhängigen Neutral-Moresnet, ehemals "Esperanto-Staat". Um den völkerverbindenden Aspekt des "Zamenhof Project" zu unterstreichen, fiel die Wahl daher auf Kelmis als Austragungsort.

<https://www.grenzecho.net/19932/artikel/2019-08-27/der-bruch-der-kommunikation>

25. August 2019

Pfälzischer Merkur

Liane Widmann-Lichtel ist nach rund 30 Jahren Ortsvorsitz in Zweibrücken jetzt zur Z.M.O.-Vorsitzenden von Rheinland-Pfalz gewählt worden.

https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/zusammenarbeitmitosteuropa-zmo_aid-45343573

24. August 2019

Berliner Woche

Die Idee zu einem Esperanto-Platz kam aus der direkten Nachbarschaft

Völkerverständigung ist eine erstrebenswerte Sache, deshalb ist nicht weiter verwunderlich, dass es in der Nähe des S-Bahnhofs Sonnenallee einen Esperanto-Platz gibt – benannt nach der Kunstsprache, die Ende des 19. Jahrhunderts geschaffen wurde.
https://www.berliner-woche.de/neukoelln/c-kultur/die-idee-zu-einem-esperanto-platz-kam-aus-der-direkten-nachbarschaft_a228361

24. August 2019

Uckermark-Kurier

Mit einer Sprache um die ganze Welt

Esperanto, eine internationale Sprache. Edeltraut Henning aus Prenzlau beherrscht sie. Das verhalf ihr zu internationalen Freundschaften.

<https://www.uckermarkkurier.de/uckermark/mit-einer-sprache-um-die-ganze-welt-2436522108.html>

21. August 2019

Pfälzischer Merkur

Eine Weltsprache, die Spaß macht

"Saluton! Bonan tagon!" So begrüßt sich jeden Donnerstag Nachmittag eine kleine Gruppe im Zweibrücker

Mehrgenerationenhaus. Sie erklären: "Ni lernas Esperanton – wir lernen Esperanto". Heiter, mit animierten Zeichentrickfilmen, Liedern auf Esperanto mit Untertiteln, um die Worte zu erkennen, oder aus Zeitschriften erinnert nichts an stures Vokabellernen und Grammatikpauken aus der Schulzeit.
https://www.pfaelzischer-merkur.de/region/zweibruecken/internationaler-esperanto-club-zweibruecken_aid-45239617

21. Aug. 2019

Herzberg

Das Esperanto-Centro bietet einen ganzjährigen Klub an.

<https://www.herzberg.de/regional/veranstaltungen/esperanto-klub-900000746-25580.html>

19. August 2019

Kultur-online

Es war einmal ... Esperanto!

Als Kind hörte ich täglich die Nachrichten in Esperanto, obwohl ich die Sprache nicht verstand. Bei uns lief damals fast den ganzen Tag das Radio, und die Nachrichten wurden einmal am Tag nach der deutschen Version auf Englisch, Französisch und eben Esperanto gesendet. Das lag daran, dass Österreich Jahrzehnte lang ein wichtiges Land für die bekannteste Kunstsprache war.

<https://www.kultur-online.net/inhalt/es-war-einmal-esperanto>

8. August 2019

Radio F.R.E.I.

Einstündige Radiosendung aus Thüringen

https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1565247600

2. August 2019

Berliner Woche

Was hat der Bezirk Lichtenberg mit der Kunstsprache Esperanto zu tun? Mehr, als manch einer glauben mag. Ausführlichere Antwort geben eine Ausstellung im Rathaus, ein thematischer Spaziergang und ein literarisch-musikalischer Abend im Zamenhofpark.

https://www.berliner-woche.de/lichtenberg/c-kultur/erinnerung-an-esperanto-erfinder_a225490

30. Juli 2019

Baden online

Picknick im Grünen mit Esperantogruppe

Große Resonanz fand das Picknick der französischen Esperantisten nahe der Mimrambrücke mit den deutschen Sprachfreunden.

<https://www.bo.de/lokales/verein-und-schulen/achern-oberkirch/picknick-im-gruenen-mit-der-esperanto-gruppe>

26. 7. 2019

Augsburger Allgemeine

Junge Unterallgäuerin: "Ohne Esperanto gäbe es mich nicht"

<https://www.augsburger-allgemeine.de/bayern/Junge-Unterallgaeuerin-Ohne-Esperanto-gaebe-es-mich-nicht-id55012451.html>

Kalendaro

Oktobro 2019

27. okt - 04. nov: AŬTUNE, la Esperanto-ferioj en Baugé, Francio. 8-a komuna feriado por infanoj, adoleskantoj, familioj, geavoj, kun kursoj, koruso kaj aliaj aktivaĵoj. Organizas: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Retadreso: kastelo@gresillon.org

Novembro 2019

01-03: Klač-Kunveno Post-Somera en Bodegraven, Nederlando. KKPS, "Klač-Kunveno Post-Somera", okazas ĉiujare en Nederlando, en semajnfino ĉirkaŭ Haloven. La oka KKPS okazos en Bodegraven, inter la grandaj urboj de Nederlando. Organizas: Nederlanda Esperanto-Junularo. Retadreso: esperantojongeren@gmail.com

07-10: 6-a Internacia Lernejo de Esperanto en Bartošovice, Ĉeĥio. Antaŭtagmeza lingvokursoj, ekskursaj, kultura kaj amuza programoj. Aliĝlimdatoj por tranokto en la kastelo: 15.9.2019 (poste sengarantie). Kontakto: verdastacio@gmail.com

08-10: Esperanto-Wochenendkursus / semajnfina kurso en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Esperanto-Wochenendkursus. Semajnfina Esperanto-kurso por komencantoj kaj progresintoj. Organizas: Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg / ICH), Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Retadreso: esperanto-zentrum@web.de

16-17: Internacia Radioamatora Konkurso de ILERA – ekde 00:00 horo la 16-an de nov. ĝis 23:59 la 17-an de nov. – en ĉiuj radioamatoraj bendoj plus Echolink. Estas rekomendite uzi la Esperantajn frekvencojn: 3.766 MHz, 7.066 MHz, 14.266 MHz, 21.266 MHz kaj 28.766 MHz. Pliaj informoj ĉe ILERA, Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj, Hans B. Welling, zum Ortenbrink 42, DE-49205 Hasbergen, Germanio, radioonde DJ4PG, interrete: dj4pg@t-online.de

22-23: Expolingua en Berlino: www.expolingua.com – rigardu ankaŭ la retpaĝojn <https://www.tradefairdates.com/Expolingua-M1375/Berlin.html>; <https://www.linkedin.com/company/expolingua-berlin>; <https://www.facebook.com/EXPOLINGUA/>

22-24: SKEJ-semajnfino en Chata u Toma, Skalica, Slovakio. SKEJ-semajnfino okazos en ĉarma ĉaledo "U Toma" (adreso: Vinohradnícka oblasť č. 158, Skalica, 90901, Slovakio). Dum tiu ĉi semajnfino atendas vin diversspecaj programeroj, kiuj ne estos ligitaj nur al SKEJ-aktivaĵoj, sed atendas vin ankaŭ interesaj distraj programeroj, teamkonstruado, ktp. Plejparto de la programo okazos en la slovaka, pro administraj kaj movadaj aferoj en Slovakio.) Organizas: SKEJ - Slovenská esperantská mládež. Retadreso: skej@esperanto.sk

30: Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek, Ĉeĥio. Tradicia aranĝo, organizata de la klubo "La Ponto" Písek, ekde la 10-a horo. Je la 11-a kultura adventa matineo, ĉi-foje en la ĉi-jare nove malfermata konstruaĵo de la Urba Biblioteko kaj ekspozicieto pri Esperanta literaturo (ĉelingeve, ankaŭ por la urba publiko). Poste tagmeza promeno tra la urbo, ev. vizito de la interesaj ekspozicioj. Posttagmeza programo dediĉita al 160-jariĝo de d-ro Zamenhof kaj al kristanaj kaj popolaj adventaj tradicioj. Detala programo disponeblas en oktobro. Kontakto: Pavla Dvořáková, pisek@esperanto.cz

30: 51-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO en Rotterdamo, Nederlando. La stabo de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO invitas ĉiujn al la 51-a Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 30-an de novembro 2019, de la 10-a ĝis la 17-a horo en la CO de UEA kaj TEJO en Rotterdamo, Nederlando, ĉe Nieuwe Binnenweg 176. Organizas: Orlando Raola (Estrarano de UEA pri Kulturo kaj Kongresoj), Said Baluči (stabano de TEJO). Retadreso: said@co.uea.org

Decembro 2019

13-15: GEA-Klerigmoduloj en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Klerigsemajnfino kun fakaj prelegoj, kun Zamenhof-festo, ktp. Organizas: Germana Esperanto-Centro (GEA-Filio), Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio. Retadreso: esperanto-zentrum@web.de

